

AVENO 10

Novajhoj de la Asocio de Verduloj Esperantistaj - Majo 1994

Karaj ge-AVE-anoj,

Aktuala stato

Ni estas nun pli ol 50 membroj de 17 landoj; mi salutas du novajn membrojn de Pollando, Boguslaw Sobol kaj Marek Warmuz, kaj du el Francio, Martine Barthelmé, kunlaborantino en la MEP kaj Bruno BOISSIERE, MEP.

Novaj informiloj: Ĉimomente ni havas du tipojn de AVE-informiloj:

1. La tradician faldfolion en pluraj lingvoj (Angla, Esperanto, Franca, Germana, Nederlanda kaj Pola (tradukita de B.S.)) kun indiko de la adreso de AVE kaj tion de UEA (ĉu necesas aldoni la adreson de SAT?). Mi verkis por uzado en germanlingvaj landoj kromajn kolumnojn: niaj celoj kaj gramatiko de E-o. Mi invitas vin, traduki tion al viaj lingvoj kaj kritiki. Mi donas nun la tekston de "Niaj Celoj" en la Internacia Lingvo:

Kompreniĝo inter la Verda Movado pere de la Internacia Lingvo Esperanto.

Ni partoprenas en la Verda Movado, respektive en la Movado por la Homaj Rajtoj de nia lando; ĉu partio, ĉu civitana iniciativo.

Ni renkontiĝas okaze de regionaj kaj internaciaj konferencoj. Pere de nia cirkulero AVENO kaj pere de la faka ĵurnalo VERDire ni informas pri mondvastaj ekologiaj, sociaj kaj socialaj, pacemaj kaj demokrataj problemoj kaj eblecoj. Nia fokuso ĉimomente ankoraŭ estas en Eŭropo.

Ĉiuj homoj estas samaj unu inter la aliaj; sed ne ni homoj estas la pivota punkto (centra punkto) de la mondo sed la vivo per si mem.

Esperanto bone taŭgas por internacia kompreniĝo, ĉar ĝi estas neŭtrala kaj facile lernebla. Esperanto estas mondvasse disvastigita, kvankam nun nur ĉirkaŭ 1 miliono parolas ĝin.

La apuda gramatiko kun siaj 16 reguloj estas la bazo de la Internacia Lingvo.

2. Eble kelkaj de vi rememoras la ĝeneralan inform-folion por Esperantistoj pri AVE. Mi prilaboris ĝin (vidu p. 4) kaj petas vian opinion. Ĝi enhavas pli da informoj sed iomete mallongigitan parton pri niaj celoj kun referenco al la Programaj Gvidlinioj de la Federacio de Eŭropaj Verdaj Partioj. Mi invitas vin kritiki kaj proponi alian teksto(parto)n; se venos pluraj, mi publikigos ilin en AVENO 11 por voĉdoni.

Letero al germanaj EP-kandidatoj

Mi sendis leteron kune kun demandilo de la Germana E-o Asocio al la plejmulto de la germanaj kandidatoj de "Bündnis 90 / Die Grünen" (nova nomo post la unuiĝo kun Bündnis 90 (=Ligo) de iama GDR). De ili respondis nur Wilfried Telkämper. En 1990 li skribis favoran salutleteron por la Germana Esperanto Kongreso en Freiburg (urbo kiu sentas sin ekologia ĉefurbo de Germanio), kiu havis la devizon "Ekologio ne konas limojn":

"... Multaj homoj okupiĝas nur pri ekologiaj problemoj sed nur parolas sian patrinan lingvon, aliaj scipovas kelkajn lingvojn, sed ne interesiĝas pri ekologiaj problemoj. Kontraŭe al tio ekzistas homoj - Esperantistoj - kiuj kunigas ambaŭ aferoj, okupiĝante pri mondvasa komunikado kaj pri ekologio, kaj ili estas la necesaj lig-eroj inter la aktivuloj de politiko, kiu ne konas limojn surbaze de la mondvastaj problem-kampoj." Sed la nuna ampleksa respondo de Telkämper montras, ke li ne kredas, ke Esperanto estus bona solvo (eŭrop-centra) aŭ povus havi sukceson; do, li ne kontraŭas Esperanton, sed ne volas doni sian nomon por ekuzi la Internacian Lingvon en la Eŭropa Parlamento.

Demonstracio de PR antaŭ la Eŭropa Parlamentejo en Strasburgo

Laŭ iniciativo de la Partio Radikale kiu eldonas sian internacian gazeton ankaŭ en Esperanto okazis demonstracio je la 3-a (?) de Majo. La celo estis, ke la EP-programo "Leonardo" enhavu ankaŭ Esperanton kiel subtenenda lingvo. La programo "Leonardo" temas ĝenerale pri klerigo de metiistoj en Eŭropo. Do, de si mem tio estas laŭdinda afero; kaj eĉ la ŝoforo de Wilfried Telkämper parolis pri tio demonstracio. Bedaŭrinde laŭ vidpunkto de Verduloj ne eblas kunlabori kun la PR. Je la baloto 1989 kvar membroj de la PR, kiu tiam ne plu ekzistis kiel memstara partio, sukcesis eniri la EP pere de diversaj listoj, ekz-e Marco Taradash (pere de la Antiprohibicia Ligo) eniris la Verdan Grupon. Ekz-e li kaj Marco Pannella kaj du aliaj PR-uloj estis kontraŭ Nelson Mandela, kiam tiu vizitis la EP dum Junio 1990. Tio montris la rasisman fonon de la PR kaj estis la fino de la kunlaboro de Taradash en la Verda Grupo (Lit.: Mike Feinstein, "16 Semajnoj kune kun Eŭropaj Verduloj" (angle)).

Ne nur ekzistas "falsaj amikoj" sur lingva nivelo, sed ankaŭ en la kampo de la politiko; rasismo certe estas kontraŭ la spirito de la Interna Ideo de Esperanto kaj same kontraŭ la spirito de Mahatma Gandhi, kies bildo bele ornamas la gazeton de la PR.

Vizito de la EP

Mi havis la eblecon viziti le Eŭropan Parlamenton okaze de prezentado de SLOW. (Sistema Malrapideco optimumigas Bonfarton kaj Ekonomian Evoluon; D-ro Walter Molt kaj laborgrupo de la sudgermana instituto pri ekologio kaj daŭripova ekonomio; artikolo sekvas en VERDire).

Mi uzis la ĉeeston paroli, parte en Esperanto, kun Bruno Boissiere (MEP, Francio), kiu en la EP parolis favore al Esperanto kaj nun estas membro de AVE.

Krome mi vizitis sinjorinon Barthelmé, kunlaborantino de Solange Vernex, MEP Francio, kiu jam ek de 20 jaroj batalas kontraŭ nukleaj centraloj (ekz-e en Wyhl, FRG) kaj ankaŭ estas membro de AVE.

Do, ni vidos kiuj parlamentanoj estos en la EP post la baloto. Mi klopodos trovi baldaŭan kontakton al ĉiuj verdaj membroj de la EP

AVE deziras bonan sukceson je la baloto al ĉiuj verdaj ge-kandidatoj.

Federacio de Junaj Eŭropaj Verduloj

En AVENO 8 mi informis vin pri la Verd-Alternativa Junularo en Germanio; ili intertempe fondiĝis sur federacia nivelo "Grün-Alternatives Jugendbündnis".

De mia filo mi ricevis la ĉarton de la FJEV (Federation of Young European

Greens (FYEG) aŭ Jeunes Ecologistes Europeens (FJEE), Rue Charles VI, 12, B-1030 BRUXELLES), internacia junulara neregistara organizo kiu estas agnoskita de la Konsilio de Eŭropo kaj estas membro de la Junulara Forumo de la Eŭropa Unuiĝo. Ili havis kongreson dum majo en Maribor, Slovenio.

Mi montros al vi la celojn el la "Ĉarto de Principoj kaj Fundamentaj Celoj de la FJEV" (kiu ŝatas traduki la tutajn 6 paĝojn ?):

- Kunigi ĉiujn junajn ekologiajn grupojn en Eŭropo, cele kuraĝigi ilian mutualan komprenon kaj antaŭenpuŝi ekologion en ĝia politika, socia / sociala kaj media aspekto;
- reprezenti la opinioj de iliaj membroj dum renkontiĝoj kun decidfaraj korporacioj de naciaj registaroj kaj internaciaj institucioj;
- kuraĝigi junajn eŭropanojn, pripensi ekologiajn temojn kaj konsekvence fari stud- kaj esplor-objektojn pri ĉi tio.

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)

* Fondiĝis dum la 1-a Kongreso de la Verduloj en Eŭropo, Liège, Belgio, 1984/4; tutmonda membreco.

* Celoj:

- Uzado kaj plivastigado de Esperanto kiel komunikilo de la Verda Movado.
- Kunligado de Esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la Verda Movado (t.e. la politika kaj eksterpolitika movado bazita sur ekologiaj principoj).
- Peranta agado inter la Verda Movado kaj la Esperanto-Movado.

* Asociita fak-ĵurnalo (sendependa de AVE):

"VERDire", aperanta 4-foje jare; prezo (4 n-oj): 25 NLG, al UEA-konto vrdr-d aŭ 450 BEF al konto vrdr-d ĉe Flandra Esperanto Ligo.

Eldonanto: Jean-Claude Thumerelle, Rue Pierre de Simpel 10, B-7784 Warneton

Redaktoro: VERDire, Postboks 2280, N-9002 TROMSOE

* Aktivecoj:

-*Landa nivelo*: Partoprenado en iniciativoj aŭ en la Verda landa partio rilate al ekologio kaj homaj rajtoj; informi pri la avantaĝoj de Esperanto kiel kompreniĝilo inter diverslingvaj homoj;

-*Superregiona*: Kunvenoj de la AVE-membroj okaze de internaciaj kongresoj de la ekologia movado; aranĝo de dumkongresaj laborgrupoj enkadre de kongresoj de la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj, aŭ de tutmonda asocio;

-*Esperanto-sfero*: Kolekti kaj pridiskuti la terminologion; ĝenerala informado pri ekologio; enkonduko en la UEA-statuton la amendon, kiu metas la "ekologiajn necesojn kaj bezonojn, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj" en la saman rangon kiel la nociojn de paco kaj de la Homaj Rajtoj kaj deklaras ilin bazo de la UEA-laboro.

-*Verda Filozofio*: Realigo de pensado kaj agado laŭ la principo, ke la vivo kaj ne la homo devas esti la centra kaj pivota punkto de ĉiu evoluo sur tiu ĉi planedo. Esperanto kiel internacia komunikilo per siaj ecoj "lingva neŭtraleco", "mondvasta aplikebla facileco" adekvatas al la ekologia principo "Eta estas bela".

* Membreco: Ĝis nun senkoste - Donaci eblas al la UEA-konto de AVE: avex-z.

Inkluzivas akcepton de la supre menciitaj celoj kaj de la Programaj Gvidlinioj de la Federacio de Eŭropaj Verdaj Partioj (aŭ kiam ekzistos, de la gvidlinioj de tutmonda federacio); havebla ĉe la sekretario.

* Sekretario / Organo:

Dr. Manfred Westermayer, Kandelstr 62, D-79194 Gundelfingen, Tel. 0761-584854

"AVENO", bulteno aperanta ĉ. 2-foje jare; (ne plu aktuala: e-posxt: Till_Westermayer@fr.maus.de)

aktuala 2009: ave@verduloj.org

Se Vi simpatias kun la celoj de AVE bonvolu skribi al la sekretario por membriĝi.